



Moresnet


kaj la Esperanta revo

**Mallonga historio de Amikejo,
surbaze de la esplorado de Philip Dröge**

Teksto kaj kovrilo: Ivo Senden
Traduko: Roberto Poort
Andrej Pechonkin



Moresnet kaj la Esperanta revo



Sude de la malgranda Nederlando, proksime de ĝia provinco Limburgo, situas la eĉ pli malgranda Belgio. Kune ili estas okcidentaj najbaroj de la granda Germanio. En Limburgo, proksime de la urbo Vaals, troviĝas la “Drielandenpunt” (Tri-landoj-punkto): turisma loko, kie oni povas esti en tri landoj samtempe se oni kree manovras la kruojn. La lastaj eŭropanoj, kiuj ankoraŭ povas memori ĝin, nun forpasis, sed antaŭ ne tiom longe, tiu Tri-landoj-punkto estis Kvar-landoj-punkto!

De 1816 ĝis 1920, la stranga eta ŝtato Moresnet, loko, kie nur kelkaj centoj da homoj vivis kaj kie la ĉefa malgranda vilaĝo ankaŭ estis ĉefurbo, estis kreita hazarde. Moresnet estis ekzemplo de kiel homoj el diversaj landoj povus vivi kune en paco, kaj do ne estas surprize, ke Moresnet estis elektita kiel estonta Esperanto-ŝtato.

En 1813 la armeo de Napoleono estis venkita. Dum jaroj li estis batalinta kaj akirinta teritoriojn, kreante grandegan francan imperion. La malnovaj nobelaj familioj de Eŭropo volis reakiri sian potencon kaj sian teron, do en septembro 1814 okazis grava kongreso en la aŭstra ĉefurbo Vieno. Grafoj, baronoj, reĝoj kaj princoj venis al la urbo kaj alportis armeon de servistoj. Eĉ la Caro de Rusio kaj la Reĝo de Prusio estis tie. La Kongreso daŭris longan vintron de intertraktadoj. La mapo de Eŭropo estis redeseignita per dikaj krajonoj, tiel ke tutaj vilaĝoj malaperis sub tiuj dikaj linioj.

En februaro 1816, nederlandaj kaj germanaj geodeziistoj renkontiĝis en Aachen, plue rafinonte la malglatajn landlimliniojn desegnitajn en Vieno. Tio postulis diplomation kaj krajonojn kun multe pli akra pinto. Ili ankaŭ venis al la landlimo ĉe la nederlanda vilaĝo Vaals, areo de nur kelkaj kvadrataj kilometroj, do estis atendata, ke la projekto baldaŭ pretos. Sed la mapo el Vieno montriĝas malorda. Devus ekzisti landlimlinio, sed pli proksima inspektado rivelis, ke la du terduonoj ne precize interligiĝas. La landlimlinio fakte rezultis proksimume du kilometrojn larĝa.

La plej bona solvo povus esti meti la veran landlimon ĝuste en la mezo de ĉi tiu areo, sed tie troviĝas la komunumo Moresnet. En tiu municipo estis zinka ŝtonminejo, kiu estis tre enspeziga. Neniu pretis rezigni pri tiun ŝtonminejo favore al unu el la najbaraj landoj. Sesdek kunvenoj okazis pri la malgranda areo, sed Nederlando kaj Germanio ne povis interkonsenti pri redistribuo.

La 26an de junio 1816 do oni decidis, ke Moresnet iĝu neŭtrala areo, ne posedata de Nederlando aŭ Germanio. Unika peco de Eŭropo. Por aldoni al la konfuzo, la vilaĝo Moresnet, kiu donis al la areo sian nomon, estis ekster la neŭtrala teritorio. Nur la vilaĝeto Kelmis situis en la Neŭtrala Moresnet. Tie loĝis 256 homoj, kiuj de tiam ne plu havis naciecon. Dum jaroj restis neklare, kiuj leĝoj validas en la Neŭtrala Moresnet: ĉu la nederlanda, la belga, la franca aŭ la germana?

Pagmetodoj ankaŭ estis dramo. La franca franko restis la oficiala valuto en Moresnet, sed civitanoj kaj butikistoj komercis per la germana, nederlanda, franca kaj eĉ aŭstra monoj ĉiutage. Simpla butikumado postulis do multajn kalkulojn. Estis tro komplike pagi impostojn por ĉiutagaj aferoj. Estis antaŭvidataj impostoj por grandaj konstruaĵoj, kaj tiu mono estis dividota inter Nederlando kaj Germanio, sed ne estis impostoj pri manĝaĵo, trinkaĵo kaj krudaĵoj. Tro komplike. Ĉio ĉi estis bonŝanca por malriĉaj loĝantoj, ĉar manĝaĵo kaj trinkaĵo estas ege malmultekostaj. Ĉio ĉi kondukis al grava kresko de la loĝantaro.

Kontrabandistoj malkovris Moresnet-on. Oni povis facile piede transiri la landlimon sinsekve dufoje kaj, ĉar la supra duono de Moresnet estas arbaro, doganistoj ne havas ŝancon kapti la kontrabandistojn. Por gejunuloj estas alia avantaĝo. Belgaj viroj, kiuj estas postulataj por fari militservon, simple iras loĝi iom da tempo en Moresnet, por ke ili ne plu falu sub belga juro.

Ĉirkaŭ ĉi tiu tempo, multaj artefaritaj lingvoj estis disvolvataj en Eŭropo. La kontinento estas ĉifonaĵo de landoj, ĉiu kun sia propra lingvo. Plej multaj homoj apenaŭ parolis aliajn lingvojn. Tio kondukos al miskompreno kaj finfine milito, iuj opiniis. Estus bone por la tuta mondo, se homoj de ĉiuj nacioj povus paroli, krom sia gepatra lingvo, universalan helplingvon, per kiu ili povus komunikiĝi trans landlimoj. Multaj homoj samtempe laboris pri la sama ideo – universala lingvo. Ironie, tio kondukis al tiom da diversaj artefaritaj lingvoj, ke ne plu ekzistas io universala. Idiomoj Neutral, Solresol, Communicationssprache, Universalglot, Volapük, Spokil, Bolak, Ro, Ido, Mundolinco kaj Nov-Latin estas nur kelkaj ekzemploj. Plej multaj artefaritaj lingvoj ne plu vivas, ĉar mankas parolantoj.

Estis nur unu lingvo, kiu ja evoluas. La lingvo de la pola-litova-juda studento Ludoviko Lejzer Zamenhof. Dum jaroj li laboris pri universala lingvo, kiu estus tiel logika kaj simpla, ke ĉiu povus lerni ĝin sen granda peno. Li publikigis sian lingvon en libro sub la pseŭdonimo Doktoro Esperanto. Kvankam tio ne estis lia intenco, fervoraj legantoj adoptis lian universalan lingvon, kaj nomas ĝin Esperanto.

Esperantistoj unuiĝadis. Kreiĝis internacia asocio, propra revuo, kaj estis okazigita tutmonda kongreso en 1905 en Bulonjo-ĉe-Marzo, kun 688 Esperantistoj el la tuta Eŭropo kunvenintaj tie por diskuti pri la estonteco de sia lingvo. Estis establota Centra oficejo en Ĝenevo estonte la loko de la unua Esperanto-biblioteko. Sed la lingvo povas vere vivi nur, se ekzistus lando, kiu rekonus Esperanton kiel sian oficialan lingvon. Kiu nacio farus tion?

Gustave Roy estis fraŭla franco, kiu parolis sep lingvojn kaj estis entuziasma Esperantisto. En 1907 Roy venis al Moresnet kaj proponis fari Esperanton oficiala lingvo de tiu neŭtrala ŝtato. Ĉi tiu ideo estis bonvenigita kun malfermitaj brakoj en Moresnet. Se Moresnet ja havas sian propran lingvon, ĝi povas nomi sin matura ŝtato, kaj Nederlando kaj Germanio povus ĉesi batali pri tiu areo kun la enspeziga zinka minejo. La centra oficejo de la Esperanto-movado ankoraŭ provizore troviĝis en Ĝenevo, sed oni serĉis konstantan lokon. Sed Kelmis estis kota vilaĝeto, apenaŭ impona urbo kiel Ĝenevo.

Unue, la loĝantoj de Kelmis devus paroli Esperanton. Tiam Moresnet povus fariĝi la Svislando de la nordo. Neŭtrala loko, kie konfliktoj estas solvitaj. Unue oni organizis grandan feston. Oni muzike akompanis la poemon de Zamenhof, kaj do Moresnet ricevis ne nur Esperantan nacian himnon, sed ankaŭ novan nomon: Amikejo. Roy faris paroladon kaj proponis, ke la tuta loĝantaro lernu kaj parolu Esperanton ene de dek jaroj. Tiam Moresnet okupos gvidan rolon en Eŭropo, ĉar la tuta mondo parolos la lingvon Esperanton en la venontaj jardekoj. Ekde tiam infanoj en lernejo estis ricevontaj horon da Esperanto-lernado dufoje semajne. Vespere estus la vico de la plenkreskuloj. Precipe la gravuloj de Moresnet estas entuziasmaj. Festoj estis regule organizataj en Hotelo Bergerhoff, kie la partoprenantoj parolis nur Esperanton. Ili venis el Aachen, Lieĝo, Duseldorfo kaj Bruselo.



En 1908 okazis la tria Universala Kongreso de Esperanto en la germana urbo Dresdeno. Roy iris tien por konvinki Esperantistojn pri la neceso starigi la centran oficejon en Moresnet. Zamenhof skribis leteron, en kiu li promesis sian subtenon por la transformiĝo de Moresnet. La letero estis eldonita ne nur en Esperanto, sed ankaŭ en la franca. Roy faris longan paroladon kaj klarigis, ke 140 homoj en Moresnet parolas bonegan Esperanton. Tio estas kvar procentoj de la loĝantaro. Neniu alia lando havis tiom altan procenton de Esperantistoj. La konferenco voĉdonis kungranda plimulto favore al Kelmis kiel la nova loko por la centra oficejo. Omaĝe al la kongreso, Vaalserberg (monteto en la urbeto Vaals) ricevos novan nomon: la Kvar ŝtonoj.

Ĵurnaloj en la tuta mondo raportis pri la nova Esperanto-ŝtato Moresnet. Iuj konsideris ĝin ŝerco, aliaj uzis ĝin por plenumi paĝojn. Sed ĝis 1908, 150 gazetoj jam skribis pri Amikejo. Ne ĉiuj estis entuziasmaj. La germana registaro en Berlino konsideris Amikejon minaco. Germanio volis nuligi la neŭtralan zonon, kaj la Esperanto-ŝtato sonis tro konstante. Germanaj oficialuloj vojaĝis inkognite al Moresnet por studi la situacion kaj verki raportojn. Ili suspektis, ke ne temas pri idealismo, sed pri komploto por konservi la areon senimposta. La belgoj ne vidis problemon kaj ne reagis. Ankaŭ Germanio ne ŝatas tion. La registaro decidis, ke estos saĝe por germanoj formi la plimulton de la loĝantaro en Moresnet.

Germanio ankaŭ malpermesas al Belgio prizorgi telefondraton tra Kelmis. Inter Belgio kaj Germanio ekestis konflikto. Pro tiu ĉi internacia kverelo la entuziasmo en Ĝenevo por movi la centran oficejon al tiu ĉi malorda terpeco malaperis, kaj la Esperantistoj en Moresnet estis seniluziigitaj. La surskriboj en Esperanto malaperis sur la vendejoj en Kelmis, la Esperanto-klasoj finiĝis. La revo pri nova lando estis frakasita, kaj Gustave Roy, iniciatinto de la revo, foriris al Francio kaj neniam plu estis aŭdata.

Januaro 1920. Post kiam Germanio perdis la Grandan Militon kaj devis cedi teritorion al najbaraj landoj, Moresnet denove aperis sur la tablo de la landlimaj redaktantoj. La Traktato de Versajlo kondiĉis, ke Germanio ne plu povas posedi Moresnet-on, kaj la intertraktantoj en Parizo decidis, ke ekde tiam la areo apartenas al Belgio. Same kiel en 1816, kiam la neŭtrala teritorio estis kreita, neniu demandis, kion volas la loĝantoj mem. Ili ĉiuj aŭtomate akiris belgan ŝtatanecon. Ĉiu, kiu volis, povis fariĝi germana aŭ nederlanda civitano, sed tiam li devis forlasi la Regnon de Belgio ene de du jaroj. Do ne eblis plu vivi en Moresnet, se oni ne volis esti belgo. Multaj landlimŝtonoj estis elfositaj, precipe ĉe la antaŭa Kvar-landoj-punkto sur la Vaalserberg-monteto. La lando Moresnet ne plu ekzistis. La Esperanta ŝtato Amikejo ne plu ekzistis. Kaj post pli ol cent jaroj, la Kvarlandoj-punkto estas nur Tri-landoj-punkto. Feliĉe, la lingvo Esperanto ne estas ligita al lando, areo aŭ aro da landlimŝtonoj. Pli ol 130 jarojn post kiam Zamenhof publikigis sian universalan lingvon, Esperanto ankoraŭ estas parolata, legata kaj skribata tutmonde. Eble ne la eta Moresnet, sed la granda mondo meritas “Amikejo.”



Teksto: Ivo Senden
 Traduko: Roberto Poort
 Andrej Pechonkin